

Flandra **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND**, St. Klaradreef 59, BRUGGE

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks
Drie en twintigste jaarg.
Nummer 11 (265)
NOVEMBER 1956

LIDMAATSCHAPSGELDEN:
Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)
Steunleden: 150 F (idem)
Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist”)
Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

La Konfuziga Dorsosako

de A. Bader, Basel

Antaŭ certa tempo mi ricevis oficialan leteron de la Sveda Esperanto-Federacio. La prezidanto rekomende sciigis, ke juna sveda samideano baldaŭ vizitos Bazelon kaj petos mianhelpon por pristudi la vidindaĵojn de la urbo; poste la nordlandano forveturos al la mediterenea maro.

Guste kiam mi febre kaj jam ĝojplene atendis la svedan amikon, mi trovis post la tria en mia atendejo, alvokante plian pacien-ton, grandegan bonuzitan dorsosakon el griza solida veltolaĵo. Ĝi kuŝis sur stigo inter la mal-sanuloj, kaj tiuj diris al mi, ke granda blondharulo demetis la portilon kaj poste foriris brue. „Do”, mi pensis”, ĵen estas postsigno de mia svedo. Li verŝajne revenos je la kvara, kiam mi mem estos plenuminta miajn profesiajn devojn. Bonege, temas sendube pri lerta viro inteligenta!”

Dum la plua kuracado mi jam pri-pensis la situacion, ĉar mi devis iomete aliigi mian posttagmezan programon por esti libera kaj je la dis-pono de l' alveninto. Mi do tuj nulgis telefono tri vizitojn fiksitajn kaj senkulpigis min pro vespera societo-kun-veno, kiun mi intencis ĉeesti; mi metis flanken gvidlibron pri Bazelo kaj skri-bis leteron al hotelo ĉe la Rejno, ke oni donu al mia gasto bonan ĉambron kun vasta vido sur la rivenon. La svedo ja povus iri tien, ĝis mi mem estus fininta mian laboron, tial notis la vojon al tiu hotelo sur urba plano, ĉar ankaŭ esperantistojn oni devas pretigi por noktaj horoj! Cetere, ner-voze akcelinte mian profesion agadon, mi sukcesis post la kvara malplenigi mian atendejon; nur la sako postres-tis sola, peze kuŝanta inter apogiloj.

Ce mia skribotablo, enordigante la priklintaran paperaĵon, mi trankvile disponis, kie ni vespermanĝos kaj kiamaniere mi poste aranĝos tiun me-morindan kunvenon svedsvisan. Sed, ho, esplorante mian monujon, mi kon-statis enhavon ne sufiĉan por tia festa

vespero. Bonŝance mi trovis en la poŝtaĵoj ĵus alvenintaj sciigon pri no-vaj pagoj poŝtĉekaj. Tuj mi skribis bileton: „Pro urĝa vizito mi devas foriri. Je la kvina mi ree alestos, certege!”, alnajlis ĝin ĉe porde antaŭ la enireje kaj rapidegis al la centra poŝtejo, kvazaŭ fluganto. Sur la re-turna vojo mi aĉetis ankoraŭ cigare-dojn kaj tramabonon por enmanigi ambaŭ al la fremdulo. Tamen, kiam mi supreniris la ŝtuparon, tiu tute ne ĉeestis, kaj ankaŭ la bileto portis nen-iajn aldonaĵojn.

Mi do ree eksidis en la metiejo kaj enkape preparis belajn esperantajn frazojn por inde saluti mian vizitan-ton. Antaŭ ol mi finpripensis tion, ĵen aŭdiĝis la sonorilo ĉe la pordo. Mi kuris tien, gajanime, sed, ho ve, mi ekvidis nur etan ombron tra la grizaj opalvitroj. Estis viro, kiun mi tuj kuraĉis de okulacidento. Post tio denove ĉe mia tablo, kompreneble, mi jam iomete ekmaltrankviliĝis pensan-te ĉu la svedo eble tute forgesis min, erarvagas ie en la urbo aŭ ne kapa-blas pro ia ajn kaŭzo trovi mian loĝejon? Nelonge mi povis mediti, ĉar denove sonis la pordsonorileto. Ree, ho ve, nur eta ombro, kiu staris en la ŝtuparejo. Envenis kvardekjaru-lo kun dikaj okulvitroj, enmane ĉiu-flanke du pezajn aĉajn paperujegojn. Mi jam ekĝojis, supozante lin kolpor-tanto facile forigota, sed li ĝentile transdonis al mi salutojn de amiko kaj petis pri okulesplorado. Filologo estis inteligenta kapo. „Mi jam venis ĉi tien antaŭ la kvina kaj mire legis vian afiŝeton. Ĉu vi skribis en hispa-na lingvo?” „Ne, tio estis skribita en Esperanto, mi atendas nun ĉiumomen-te la viziton de mondlingvana amiko el Svedujo”, mi respondis akcente kaj rapididigis mian agon laŭcirkonstance; baldaŭ ja estos la sesa kaj la svedo certe finfine alvenos. Tamen tio tute ne okazis. Por distri mian ĉiam pli streĉan animstaton mi ŝatis pasigi la

daŭrigo p. 2

Ĉu vi volas gajni la Milionon?

Dank' al la anonca kunlaborado de diversaj gravaj komercaj societoj la eldonejo „MONDO” intencas eldoni, - ekde la proksima monato -, monatan gazetforman revuon, kiu propagandos Esperanton; kiu enhavos, en ĉiu nume-ro, tutan lecionon kaj kiu estos disdo-nata en ĉiuj leterkestoj de diversaj regionoj de la lando kaj, iom post iom, de tuta Belgio.

Ne necesas, ke ni substreku la gra-vecon de tia entrepreno, por la disvas-tigo de nia lingvo en nia lando. Ĝi estas evidenta!

Sed la eldonistoj havas pli vastajn planojn. Ili samtempe volas organizi grandajn senpagajn konkursojn por la abonantoj de tiu gazeto, kiuj povos gajni premiojn, por entute

UNU MILIONO DA FRANKOJ!

Esperantistoj kaj ne-esperantistoj, - kiuj lastaj cetere facile povas lerni la lingvon, trastudante ĉiumonate la lec-ionon kiu aperos en la revuo -, rajtas partopreni al tiu giganta konkurso.

La abonprezo al la revuo estas Fr. 25.-*) por la tuta jaro. Oni povas sendi sian pagon al P.C. 890.81 de la Eldonejo „Mondo”, Brasschaat (apud Antver-peno).

Kaj niaj membroj kaj legantoj povas kaj devus, ne nur sendi sian propran abonprezon, sed fari propagandon por ke ankaŭ multaj eksterstarantoj parto-prenu la konkurson.

La sperto montras, ke multaj homoj serĉadas regule okazojn por partopreni al konkursoj iaj ajn, kiuj povas havigi al ili premiojn.

Nu: Ni ĉiuj kunhelpu por ke multaj partoprenantoj sin anoncu por tiu ĉi revuo kaj tiel sukcesigu la grandan entreprenon de niaj amikoj.

*) por ne-Belgoj Fr. 30.—

La Olimpaj Ludoj kaj la Lingva Ĥaoso

500 interpretistoj bezonataj.

Ni sciigis ke oni en Melbourne, ĉe la Olimpaj Ludoj bezonas 500 interpretistojn, sed ke el la sin anoncintoj nur 300 povis plenumi la postulojn, kaj mankas la tempo por akiri la tutan nombron. Partoprenos la Ludojn atletoj el proksimume 70 landoj kaj 50 diversaj lingvoj estos parolataj do vera paradizo por la tradukistoj!! Ili devas majstri jenajn lingvojn: angla, franca hispana, portugala, Finna, rusa, bulgara ĉeĥa, sveda kaj krome lingvojn, kiuj estas parolataj en Punjaab kaj Hindujo.

Vi scias, ke en la antikva Grekujo, dum la tempo de la Olimpaj Ludoj devis ĉesi ĉiujn malpacojn kaj kverelejn inter la gentoj partoprenantaj ilin. Do tiel longe kiel daŭris la Ludoj regis paco en la lando kaj antaŭaj

daŭrigo de p. 1

tempon, parolante kun la intelektulo pri lingvaj kaj artaj problemoj kaj mi admiris ĝisfunde ties konon kaj sperton en ĉiuj rilatoj. Je la sepa mi ĉesigis, iomete obstine, la konversacion kaj lerte, laŭ kuracista rutino, mi komplimentis la klienton al la pordo; li reprenis tie la kvar ledajn monstrojn kaj, ŝargita kiel stacidoma portisto, forŝanceliĝis.

Plenkontenta mi opiniis min fine definitive libera, kaj miaj pensoj tuj denove flugis al la sveda samideano prokrastema. „Sed, kie li restadas?”

Reirinte al la skribtablo mi ĵus volis telefoni al fama gastejo, por ke oni pretigu por ni ambaŭ apartan vespermanĝon kaj ne forgesu jam nun iomete varmigi la vinon, kiam la pordonorilo fulme interrompis tiun intencion. Ree, ho ve, oni ekvidis nur etan ombron. Estis, terurege, la antaŭa viro, sed ĉifoje sen paperujegoj, kaj li surprizis min per la vortoj: „Bonvolu senkulpigi min, ĉar mi ja tute forgesis en via atendejo mian dorsosakon, en kiu troviĝas libroj.”

Verŝajne mi vidigis en ĉi tiu momento strangan, eble aĉan mienespiron, mi nur memoras, ke la paciento, rulante mirigita kontraŭ min siajn miopajn okulojn malantaŭ vitroparo surnaza, foriris rapide kiel kato.

Post kiam mi estis ferminta la pordon, mi rigidigis konsternite sur loko kaj jen mi eksentis, kiel malofte dum mia ĝisnuna vivo, ke mi vere ĉi tiun tagon akiris — longan barbon, kvazaŭ verdkoloran pere de nia kara Esperanto!

Kaj iĝis eĉ longedaŭra barbo! La plej bedaŭrinda fakto en tiu historieto estas: Malgraŭ ĉiuj miaj penoj tiu nordlanda samideano restis for; li neniam vizitis min.

malamikoj fariĝis „amikoj”. Tiu regulo estas poste unu el la motivoj por la arango de la Ludoj en la pli postaj jarcentoj laŭ la iniciativo de S.ro P. de Coubertin, kiu opiniis, ke la Ludoj ne nur povas servi la evoluon de diversaj sportoj sed ankaŭ helpi la interfratiĝon de la popoloj pere de la sportulaj grupoj diverslandaj partoprenantaj la grandan sportmanifestacion.

Tamen estas klare, ke pro la granda nombro da lingvoj uzataj, tiu deziro de la iniciatinto ne plenumiĝis kaj neniam povos plenumiĝi tiel longe kiel oni ne sukcesas apliki dum tiuj Ludoj unu internacian lingvon kiu kompreneble ne povos estis alia lingvo ol Esperanto. Tial estas laŭ nia opinio grave, ke la esperanto-asocioj en tuta mondo pli intense informu la sportulajn rondojn pri nia lingvo. La unua paŝo povus esti sendi al la diversaj landaj Olimpaj Komitatoj la diverslingvan flugfolion eldonitan de U.E.A. kun aldonita informo letero. Se el tio rezultas ian kontakton oni povas daŭrigi laŭ vojoj, kiujn al ni montros la cirkonstancoj.

F. W.

EL LA FLANDRA POEZIO

LA AGLO

ALBRECHT RODENBACH

(1856-1880)

*La reĝa Birdo sur rokpin't
rigardis en sunhelon
kaj en kvietaj majestec'
mezuris la ĉielon.*

*Sed kaŝalrampas kun malic'
spione la Serpento
malnobla. Kaj en la moment',
dum per flugiletendo*

*li pretas flugi al reĝland'
en vibra sunobriilo,
perfidaj ringoj premas lin
kiel risorta ilo.*

*Li supreniĝas kun potenc',
orita per sunskvamoj,
sed lekas sur ŝirita brust'
venenaj langoflamoj.*

*Vi nobla, tra via larĝa vojo
plualteniĝu nur,
kaj mordu li — jen via sort'!
la Fiambicnu!*

trad. H. Vermuyten

KORESPONDADO

S.ro Andrej Sidorov, ul Nekrasova 12, Krjukovo, rajon Ĥimka, Moskovs-aja obl. U.S.S.R.

Deziras korespondi nur pri la temoj:
a) tradukado de esperantigitaj literaturajoj en naciajn lingvojn.
b) aŭtosugestio kiel kuracfaktoro.

Vivanta Latina Lingvo

150 latinistoj kongresis en Avignon

Sub la signo de la vivanta latina lingvo, kunvenis en Avignon (Francujo), de la 2a ĝis la 6a de septembro, pli ol 150 kongresanoj el 22 malsamaj landoj. Tie rendezvis la plej eminentaj latinistoj el la tuta mondo kun aliaj scienculoj interesigantaj pri la disvastigo de komuna internacia parolilo.

Deksep Belgoj, plejparte profesoroj universitataj aŭ mezgradaj, partoprenis.

La plej pozitiva duono de la partoprenantoj, inter kiuj la Belgoj, precipe okupiĝis pri la renovigo pedagogia kaj scienca de la latina lingvo en la universitatoj kaj mezgradaj lernejoj.

Dank' al reciprokaj rezignoj oni akiris „triumfon” pri la unuecigo de la elparolado latina: ne plu ekzistos elparolado „franca” aŭ tradicia, ne plu krom en la liturgio, elparolado „itala” aŭ „eklezia” aŭ ankaŭ „tradicia”, sed nur entute prononcado tiel dirite „scienca” aŭ „redonita”.

Sed baldaŭ, (eble sub influo de tiu diabla Provenca suno, kiu instigis „Tartarin” al nevola troigo,) montriĝis kiel ĉefa celo de la kongreso la kreado de latina lingvo vivanta, praktika; scienca *internacia helplingvo*, destinata al ĉiuj scienculoj por iliaj privataj rilatoj, leteraj aŭ parolaj kaj por iliaj kunvenoj kaj kongresoj internaciaj. Oni eĉ parolis pri latina sintakso simpligita en deko da esencaj paĝoj! (Post la Basic English ni do havos verŝajne bazan Latinan lingvon!)

Ke oni multe laboris en tiu kongreso, estas sufiĉe pruvita per la nombro kaj la diverseco de la komunikajoj, la tre varia deveno de la oratoroj kaj la multeco de la uzitaj lingvoj.

Konkludo: la plej eminentaj latinistoj el la tutmondo ne kapablas uzi sian „vivantan” lingvon por interkompreniĝi!

Projekto ekzistas por ke la estonta kongreso okazu en Belgujo en 1958 dum la Internacia Mondekspozicio de Bruselo. Ĉar tiu ekspozicio nuntempe forte propagandas la lernadon de lingvoj, ni konsilu al la eminentaj latinistoj, por ke ili povu tiam komforte diskutadi pri la vivanta latina lingvo, ke ili de nun eklernu tiun modernan kaj vere vivantan internacian lingvon, kiu nomiĝas „Esperanto”.

Sa Pu Pej

**

(Informoj ĉerpitaj el artikolo subskribita F.P. en „Le Soir” de la 13/9/56).

BIBLIOGRAFIO

El la Kataluna Poezio

DIMANÇO

JOAN MARAGALL (1860-1911)

*Kiu ne havas ĉe si
en la fenestro florpotojn,
unu birdeton en kaĝo
kaj enamigeman koron,
tiu nek konas felicon
nek iam ajn ĝin ekonos.
Ĉar estas en la dimanĉo
ĉe vekig' plej granda ĝojo
aŭdi la birdan pepadon,
vidi sur floroj la roson
kaj por ĝu' kun amikino
plenan tagon de ripozo.
Kun amikin' atendanta
vian venon ĉe balkono,
vestita per festa vesto,
la ves' en hela koloro.*

trad. Amalia Nunez Dubus

(la popola poezio baziĝas sur la asonanco. Tial la „paraj” versoj (2-4-6...) havas la samajn vokalojn en la finiĝo (O) Se oni legas laŭtvoĉe, oni perceptas klare la rimon, ĉar same kiel en Esperanto, la vokaloj komendas (n.d. l.t.).

musofamilio. Musoj kaj musetoj kondukas kiel ordinaraj plenkreskuloj kaj infanoj, loĝas en domo kiel vi kaj mi, atente aŭskultas al la instruistino en la klasoĉambro, kaj hejme ludas en ĝardeno aŭ per tradiciaj ludiloj, kiel ĉiu infano en la mondo. Tutordinaraj okazaĵoj envere, sed la musaj ĉefroluloj teksas kvazaŭ fabelan atmosferon kiu plaĉas al la juna lernanto, kaptas lian atenton. La speciale musaj petolaj aldona humurplenan noton kiu igas la lernadon amuza kaj des pli katenanta.

La materialon oni instruu laŭ la rekta metodo: paroli kaj paroligi. Precipe multe, multege paroligi. Neniel necesas turni sin al la gepatra lingvo por komprenigi: preskaŭ ĉiu numero estas abunde ilustrita per simplaj desegnaĵoj kiuj kontentige asocios la novan al la koncerna objekto.

Tamen ne sen iom da surprizo la neavertita instruanto konstatas, ke la lingvaj malfacilaĵoj tuj amasiĝas. La unua leciono, ekzemple, prezentas 45 diversajn vortojn, kompreneble tute novajn al komencanto. Imagu kiom da fortostreĉo ili postulos antaŭ ol la lernanto ilin komprenos, memoros kaj reproduktos. Pluralo uziĝas flanke de singularo, rekta komplemento (kun la distingiva N) apud subjekto. Helpan manon etendas la teksto, uzante nur la AS-formojn de la verbo. Sed aliflanke troviĝas substantivoj jen kun LA, jen sen artikolo

(daŭrigo sur p. 6)

Voltaire: „Tri verkoj de Volter: Kandid aŭ la Optimismo; Zadig aŭ la Destino; Senartifikulo”.

Tradukis el la Franca originalo: E. Lanti.

Eldonis: A. T. Paris, Avenue Gambetta 67 jaro: 1956; 312 paĝoj; prezo ne indikita; formato: 20 x 13. Presejo: Jozsef Moskric Ljubljana.

La tre multaj esperantistoj kiuj ne konas la Francan lingvon kaj kiuj, por meriti la nomon de kulturpersonoj, devas nepre koni Voltaire, agos bone aĉetante kaj legante tiun-ĉi libron. Por tiu nova, rapida kaj agrabila surprizo, SAT plene meritas nian dankon. Ĝi prezentas tie-ĉi 3 el la plej tipaj verkoj de Voltaire, i.e. la ĉefverkon „Kandid”. Kiel satiro, tiu lasta verko certe egalas la plej famajn de la mondliteraturo kiel ekz. „Don Kihoto” kvankam tiu lasta estas pli milda. SAT havis la bonan ideon enpresigi la antaŭparolon kiun Lanti siatempe skribis Efektive per tiu antaŭparolo la leganto lernas koni Voltaire... kaj Lanti mem(!) Lanti komencas, dirante ke Kandid estas ankoraŭ ĉiam aktuala ĉar la malvirtoj kiujn Voltaire tie vipis ankoraŭ nun furiozas ekz. la maltoleremo, fanatikeco. Lanti diras tion jenmaniere: La Jezuitoj-plej diversspecaj-estas same influhavaj, regemaj...”

La eldonantoj, pro la fakto ke ili represas tiun aserton, verŝajne samopinias. Nu, la verkanto dt tiu-ĉi recenzo iom konas la Katolikan Eklezion; kaj tial li eble rajtas iom precizigi la aferon. Ke la Eklezio Roma estas „potenco”, tio estas nepridubbla. Ke Jezuitoj luktas por ĝiaj glo-ro kaj plifortigo, ankaŭ tio staras ekster dubo kaj estas eĉ normala. Sed ĉio tio ne ankoraŭ identas kun fanatikeco. Certege, estas tre multaj fanatikaj kaj netoleremaj gemembroj; tamen eble malpli ĉe la Jezuitoj; kaj pli inter la religiuloj kaj la sekulara pastraro. La aŭtoro verŝajne pensis ke la Societas Jesu ne konis evoluon kaj estas ankoraŭ tia kia ĝi estis en la 17a jarcento? Pli. Se doni ekzemplon de netoleremo, kial ne esti senpartia kaj menciigi netoleremon ankaŭ de la alia flanko, ekz. la Framasonoj?

En la sama antaŭparolo E. Lanti mencias modernajn ne malpli detruajn fanatikojn: la naciisma, rasisma, faŝisma, partieca... Denove li forĝis ion aldoni: la bolŝevista. Ankoraŭ foje, li mencias kelkajn el unu flanko; kial ne unu el la alia flanko? Kaj ankoraŭ ĉiam samloke E. Lanti rememorigis la viktimojn de la „Sankta Inkvizicio”. Tiu institucio efektive senkapigis aŭ bruligis tre grandan nombron da personoj. Ĝi estas terurajo de la historio. Tamen, la aŭtoro, kiel

tiom da personoj, komprenis tiun fenomenon per la nuntempa kompreno, laŭ la hodiaŭaj psiko kaj konvinkoj. Tiel ili tute ne kapablas kompreni la veran signifon de tiu historia fakto.

Rilate la tradukon, mi ne havas multajn rimarkojn. Lanti diras ke li celis fidele sed ankaŭ klare kaj facile kompreneble traduki. En tio li suktsis. Cetere, la libro estas kontrolita de la SAT-Literatura Komitato. Tamen mi ŝatus scii kiamaniere tiu komitato pravigus la adverbformon en: „Estas vere, ke ĉio konsiderite, la sorto...” Ĉu tie ne devas stari la litero a? (paĝo 105). Sur paĝo 111 mi legas: „Kandid laŭdis ties ĉiujn belecojn”. Laŭ mi devas esti: belaĵojn. Ĉu ne pli bone rezervigi la sufikson „eco” nur por ideaj konceptoj? Sur paĝo 179 mi malkovris alian malbonan tradukon: „Kredeble, diris Zadig, esti vive bruligita, tio kaŭzas tre delikatan plezuron. „Unue, devas esti. bruligata. La Francalingva frazo tktstas „il faut qu'il y ait un plaisir bien délicieux à être brulée vive”. Evidente „être brulée vive” ne faras distingon inter nun okazanta kaj jam okazinta. Sed en Esperanto ni kapablas doni tion. Kaj la signifo estas certe: okazanta. Due. La vorto delikata estas tie-ĉi malĝusta vorto. Ĝia signifo ja estas: neforte kaj neakre impresanta niajn sentumojn (vidu P.V.). Tie-ĉi devis troviĝi vorto kun la senco de ĝuego. Paĝo 237 entenas frazon kiu metas nin antaŭ problemo: „Ĝi ankoraŭ amus min se urso ne manĝus ŝin. „Evidente devas esti: se urso ne estus manĝinta ŝin. Kial la aŭtoro ne skribis tiel? Pro la malbela frazono? Mi komprenas. Sed ĉu tio pravigas malĝustajn? Ekzistas solvo!: se urso ne manĝintus ŝin. Mi scias ke tio ne plaĉas al kelkaj. Sed mi opinias ke ĝi estas tute laŭ la strukturo de la Esperanto-gramatiko, ke ĝi estas ne malbela, kaj ĉiuokaze ĝi estas solvo. Kiom vi opinias pri tia frazo ekz.: mi ne estus foririnta, se mi estus sciinta...?

Lasta rimarko: La diraĵoj de la personoj ne estas inter citiloj. Bedaŭrinde. Ĉar kelkfoje oni devas religi. Ekzemplo sur paĝo 236: „farante delikatajn afablaĵojn, li respondis, por plaĉi al la personoj...”

NYT.

ESPERANTO POR INFANOJ. Verkis G. Gladstone Solomon.

4-a eldono, 1956. The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo. 68 p., 12 x 18; broŝ. Prezo: 2 ŝil. 6 pencoj, aŭfranco 3 p.

En la spaco de 26 lecionoj la teksto skizas per tutsimpla lingvo kelkajn ĉiutagajn scenojn el la vivo de

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schriftelijke cursussen en uitleendienst:
 Mej. A. C. H. van der Beek, P. C. Hooftstr. 90, Amsterdam-Z.
 Penningm.: B. J. J. Albers, Olympiaweg 69^{III}, Amsterdam-Z. Postrek. 34563.
 Adm. Ned. Esp.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O.
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewewstr. 29 Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-ĉefd. F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen. Postrek. 822075.

Universala Esperanto Asocio**Nederlanda Teritorio**

Plenumante la peton de la administra oficejo, mi invitas vin frue pagi la kotizon por 1957. Por eviti amasiĝon de la laboroj mi afable petas vin per baldaŭarealiĝo helpi tiurilate.

Ni ĉiuj ege deziras bonan funkciadon de nia Asocio. La membronombro en la reprezento eksteren ludas gravan rolon, pri tio ni certe samopinias. Ĉiuj membroj en nia Teritorio bonvolu helpi en la varbado de novaj membroj, por ke nia Asocio en 1957 estu pli forta ol iam.

Montru nian revuon kaj jarlibron al kandidat-membroj!

La kotizoj estas:

Dumviva membro (D.M.) f 200.00
Patrono (P) f 100.00
Membro subtenanto (M.S.) f 15.00
*Membro abonanto (M.A.) f 10.00 **
Membro kun jar-
*jarlibro (M.J.) f 5.00 **

Kiel vi vidas la kotizo por M.J. por 1957 estas plialtigita, necese pro la ĉiama plialtiĝo de la prezoj de materialoj ktp.

Por eviti duoblajn laborojn kaj kostojn, mi afable petas al vi pagi la kotizojn nur pere de la poŝtĉekkonto 2426.19 je mia nomo.

Bonvolu atenti, ke la fakto, ke la administra oficejo nun estas en nia lando, neniel ŝanĝis la pagmanieron de la kotizoj aŭ anoncado de novaj aliĝoj!

Novaj Delegitoj, Vic-delegitaj kaj Fakaj delegitoj

Se en via loko ne estas ankoraŭ delegito, bonvolu anonci vin por tiu tre interesa funkcio. Al la delegitoj mi petas afable helpi en la nomigado de vic-delegitoj kaj fakaj delegitoj. Bonvolu fari proponojn al mi post kiam mi petos aprobon de la landa Asocio.

Se iu povas reprezenti interesan fakon, ekz. fremdultrafikon, sciencan aŭ alian fakon, ne hezitu fari proponon.

PLIFORTIGU LA MONRIMEDOJN DE NIA MOVADO

Ofte okazas, ke ne-esperantistoj volas iel subteni nian movadon, ili ne lernis la lingvon pro iu ajn kaŭzo. En tiaj kazoj bonvolu peti libreton kun 10 kvitancoj po f 5.00. Aĉetanto de tia kvitanco estas per la pago de f 5.00 apoganto de U.E.A. Pliajn informojn mi volonte donos laŭ via peto.

Mi ricevas petojn pri la ebleco pagi la kotizojn por pluraj jaroj.

Al tiuj bonaj geamikoj de U.E.A. mi informas, ke U.E.A. tre aplaŭdas la ideon. Trankvile transigu al mi la sumojn, mi akurate traktos ilin. Bonvolu klare indiki por kiuj jaroj la kotizoj estas celataj.

Mi esperas, ke vi baldaŭ realiĝos al nia Asocio kaj helpos en la varbado de novaj membroj.

Plej sincera via
 J. Telling.

Ĉefdelegito de U.E.A. en
 la Nederlanda Teritorio.

*) Membroj de L.E.E.N. rajtas depremi guld. 0.25.

Trilanda Renkontiĝo en Heerlen

En la Belga-Germana-Nederlanda-limregiono ĉiujare okazas trifoje, alterne en alia lando, renkontiĝoj de esperantistoj. La 1an kaj 2an de decembro estonta la 50a renkontiĝo, kiu samtempe do estos jubilea renkontiĝo, okazos en Heerlen, urbo en la centro de la provinco Sud-Limburgo. Laŭ la provizora programo sabatvespere estos konversacia kaj amuza parto kaj dimanĉmatene kaj posttagmeze la afera parto.

Invitataj ne nur estas esperantistoj el la koncerna limregiono, sed ankaŭ esperantistoj el la tuta esperantujo. Oni petu programon al la sekretario de la organizanta komitato s-ro F. H. Vilain, Poststraat 8, Kerkrade.

Komunikoj de la Ĉefestraro**Regularo**

En aŭgusto ni sendis al la sekciaj estraroj 3 ekzemplerojn de la statuto kaj la reviziita regularo. Ĝis nun preskaŭ neniu sekcio reagis.

La ĉefestraro ne presigis la regularon por konservi en la ŝranko.

La statuto kaj regularo estas la bazoj sur kiuj la societo estas konstruita. Ĉiu bona L.E.E.N.-ano devas posedi ambaŭ. Do, mendu la novan regularon. Por novaj anoj senpage, por malnovaj f 0.25.

Informilo

Jam dum jaroj ni bezonis taŭgan broŝuron por informi la publikon.

Feliĉe ni nun denove havas taŭgan libreton. Ankaŭ tiun ĉi libreton la ĉefestraro ne presigis por meti en la ŝrankon. Ĝi devas ŝvarmi en ĉiujn mediojn.

Ĝis nun tre, tre malmultaj sekcioj mendis la libreton. Ĉu tro multekosta? Tute ne, nur f 0.08.

Karaj geamikoj, iom pli da aktiveco estas dezirinda, ne, eĉ postulata. Zorgu ke la tuta eldono baldaŭ estas elvendita. Via aktiveco povas decidi pri eventuala represado.

El la sekcioj

La sekcio Haarlem akiris la permeson disponigi por la legantoj de la Komunuma Biblioteko paĝindikilojn sur kiu estas presita: Esperanto.

Logika. Praktika. „Het gebruik van Esperanto is een daad van internationale wellevendheid”. Inlichtingen (sekvas la adreson).

Ni rekomendas al la aliaj sekcioj fari la saman. Sekcio den Helder jam sekvis la ekzemplon de Haarlem.

Al interesigantoj Haarlem volonte sendos specimenon. Skribu al s-ro de Wolf, Joh. de Breukstr. 18, Haarlem.

Estas malmultekosta, efika propagandilo.

Propaganda Kunveno

La 21an de septembro okazis propaganda kunveno fare de la P.T.T.-Esperanto-grupo „Esperanto estu nia celo” en Rotterdam. Parolis S-ino J. C. Isbrucker-Dirksen el Hago pri „Esperanto, la Mondlingvo”. En la fino ŝi faris mallongan Cseh-metodan lecionon. La publiko tre aplaŭdis la parolantaron. Anoncis sin 8 personoj por la kurso, komenciĝonta la 4an de oktobro.

Driesen, prez.

Universala Esperanto-Asocio... kaj Vi

Kara Leganto,

Vi membriĝis al via enlanda Esperanto-asocio, ĉar vi volas laŭpove subteni movadon kies celo vin entuziasmigis; vi abonis ĝian gazeton, ĉar vi volas paŝon post sekvi ĝian konstantan luktheadon por plia disvastigo de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj. Kaj tion farinte, vi prave ĝojas pro bone plenumita kunlaboro.

Kiel celkonscia esperantisto tamen, vi sentas ardi en vi pli ambicia deziro: ankaŭ ekster la propraj landlimoj sur internacia tereno, vi volas helpi laŭeble. Certe, unuopolu perdiĝas kiel malmultsignifa ereto en la vasteco de la mondo... Sed, se guto al guto, aliĝas, ĉu ne maro fariĝas? Vi konscias, ke unueco estas forto, ke fortan internacian organizaĵon la esperantistoj nepre bezonas, por ke ĝi pli kaj pli efike influu la oficialajn instancojn, ekz. Uneskon, Eŭropan Konsilantaron k.s., kiuj povus konsiderinde akceli la venkon de Esperanto.

Kial do, Kara Leganto, kial do ĉi-okaze vi ne sekvas la ekzemplon de tiom da samideanaj amikoj, aliĝante al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, la unusola esperantista organizaĵo internacia sin okupanta nur pri la progresigo de Esperanto?

Fariĝante „membro kun jarlibro“, vi ne nur utilas al la Movado, sed vi ankaŭ akiras valoran dokumentaron: la Jarlibron kun ĝiaj informoj pri UEA, pri Landaj Asocioj, pri gazetararo, kun ĝia ĝisdata librolisto, kun adreso de 2000 delegitoj kies servojn vi rajtas uzi.

Aŭ, eĉ pli bone, aliĝu kiel „membro-abonanto“, ĉar tiel vi ricevos, krom la jarlibron, ankaŭ la ĉiumonatan revuon ESPERANTO, kies varia enhavo sen ia dubo vin interesos.

Ne hezitu do, Kara Leganto, pro internacia solidareco ankaŭ vi viciĝu inter la individuaj membroj de UEA. Bonvolu samtempe pripensi ke per *tuja* aliĝo vi evitigas al la Centra Oficejo nenecesan amasiĝon de laboro ĉe la jarfino. Ne preterlasu do havigi *jam nun* vian kotizon por 1957 al via ĉefdelegito aŭ al via peranto: por Nederlando: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam-C, pĉk. 2426-19; (vidu la artikolon de S-ro Telling).

Por Belgujo R.B.L.E.: J. Soyeur, rue du Chêne 91, Seraing, pĉk. 95894; aŭ

Mirakla Medalo

Ĉiu kiu skribos al Samideano Frato Arni (Stropstraat 127, GENT) ricevos Esperantlingvan priskribon pri kaj ekzempleron de la mirakla medalo farita laŭ la aperoj de la Dipatrino al fratino Labouré.

Flandra Ligo Esperantista.

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.

Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).

Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.

Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)

U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.

Redakcio F.E.: Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.

Koresponda kurso: H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

F.L.L.E.: F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, pĉk. 4161.35.

La KOTIZOJ estas por 1957,

	en Belg.
Membro kun Jarlibro:	b.fr. 70.—
Membro-Abonanto:	b.fr. 140.—
Membro-Subtenanto:	b.fr. 210.—
Abono al „Esperanto“ sen membreco:	b.fr. 105.—

STATUTA GENERALA LIGKUNSIDO

GENT 9.12.1956

La flandraj esperantistoj kaj precipe la ligaj kaj sekciaj estraranoj kaj la reprezentantoj estas petataj ĉeesti la sube indikitajn kunsidejn, konforme al art. 9 de la organiza regularo. La estrarkunveno kaj la ĝenerala kunveno okazos en kafejo "Colombophile" F. D. Rooseveltlaan (Zuidpark — tramo 7).

ESTRARKUNVENO (ek de la 10a horo)

1. Malfermo — 2. Financa raporto — 3. UEA — raporto — 4. Revuo
5. Eksiĝo de 6 estraranoj — 6. Koresponda kurso — 7. Gazetara servo — 8. diversajtoj — 9. Fermo.

JARKUNVENO (15a horo)

1. Malfermo
2. Financa raporto
3. Sekretaria raporto
4. UEA — raporto
5. Koresponda kurso
6. Gazetara servo
7. Gazeto
8. Bilanco Kongreso Gent
9. Eksiĝo de 6 estraranoj kaj elektado
10. Kongreso 1957 en Eindhoven
11. Varbado — Kotizoj
12. Diversaj proponoj
13. Fermo.

Aldonoj al tiu tagordo, proponitaj de la gemembroj, devas esti ĉe la sekretario antaŭ la 12.11.1956;

La estraro decidis..... (Gent 7.10.56)

La kotizo por koresponda kurso estos plialtigata ĝis 200 F. pro la fakto ke la prezio ĝenerale estas multe pli

altaj ol en la tempo kiam ni fiksis la kotizon (en 1948). La estraro, pro peto de la kursgvidanto, S-ro Vandeveld, donos estonte al ĉiu lernanto de la skriba kurso, kiu finstudas ĝin ateston.

La estraro proponas al la ĝenerala kunveno la samajn kotizojn por membreco al F.L.L.E. kiel por 1956.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

La membronombro de UEA atingis fine de Oktobro 17835; pli ol 5000 novaliĝintoj, kompare al 1955, je la sama dato, precipe pro la konsiderinda kresko de la asociaj membroj.

NI GRATULAS

Flandra Ligo Esperantista kaj precipe ĝia Sekcio Gent gratulas sian fidelan anon S-ro V. Vanneste pro lia nomigo kiel profesoro ĉe la Profesiaj kursoj de la kuk- kaj tortbakistoj, kursoj okuzantaj en Brussel sub la aŭspicioj de la Ministerio de la „Middenstand“ por la metiistoj flandre parolantaj.

Grupa Vivado

„Paco kaj Justeco“ Brugge

Daar zijn weer de laatste speeldagen aangebroken. In het besef dat het weldra weer voor maanden gedaan is, komen de sportieve leden telkens talrijk op. Echter alleen de Zaterdagnamiddag; want 's avonds is het reeds te vroeg donker. Midden september zijn we met een cursus begonnen. Zoals tegenwoordig met al de publieke leergangen, weinig talrijke opkomst. Maar wij worden nu al gewaar dat we er enkele zeer goede leden bij zullen krijgen; en dat is het voornaamste. Ook de werkvergaderingen zijn weer regelmatig aan gang. Op Donderdag 11 okt. hadden wij hersengymnastiek. Uitstekend verzorgd door Roger Martens. Wij krijgen waarempel een stel specialisten in dat genre. Op Donderdag 18-X-'56 spreekt van de voorzitter over de „neologismoj“. Ook worden telkens de interessantste artikelen vermeld of voorgelezen die wij in de Esperantorevuuo vinden. En er zijn er heel wat.

(daŭrigo de p. 3)

kio jam tuj dekutimigu al la etuloj serĉi en Esperanto ekvivalenton de la nedifina artikolo.

Same rapide la 2-a leciono enkondukas kvardekon da novaj vortoj, la adjektivon, la pluralon en akuzativa formo, kaj preterpase: infinitivon. La 3-a: tridekon da novaj vortoj kaj la unuan paŝon pri la sistema vortderivado per la klarigo de la prefikso MAL. La 4-a: pliajn dudek vortojn kaj izolitan adverbos.

Evidentas, ke tiel vastan vortprovizon la infano ne asimilos, se ne per konstanta ripetado. Nur ege pacienca kaj ne malpli sperta instruanto, plene informita pri la bezonoj de la infano, per senĉesa praktikigado en ĉiam varianta formo, sukcesigos tiajn lecionojn.

Sendube ankoraŭ longtempe la infanoj eraros pri la akuzativa N, kiel ili poste misuzos la direktan N, aŭ esprimojn kiel „estas varme”, „montrante la tablon”, k.t.p. Sed ĉu tio vere jam tiel gravas?

Estas ja la rolo de la instruanto krei parolkutimojn, krei la lingvosenton, havigi ŝablonojn laŭ kiuj la infano analogie kaj instinkte konstruos korektajn frazojn. Estas tro frue por sin turni al la rezonado, frazeroj. La aŭtoro agis saĝe, preterlasante ĉiujn gramatikajn regulojn kiuj cetere nur komplikus la aferon en neformitaj spiritoj. Dum li trafas kaj preskaŭ nerimarkite komprenigas la sencan de nerealeco ĉe la US-formoj (ekz.: „se mi tranĉus mian fingron per tranĉilo”) per modeste aldonita interkrampajo („sed ŝi ne tranĉis ĝin Ho ne”).

En la kvin unuaj numeroj la aŭtoro sisteme per streketo apartigas la finaĵojn. Estas dubinde, ĉu tiu procedo multe profitigas. Ĝi eĉ pli ofte konfuze efikas ĉe la junaĝuloj, malfaciligante la legadon kies tekniko ili apenaŭ mastras en la gepatra lingvo, kaj kreante erarigajn vortbildojn kiuj ĝenas la ortografion. Ĉar temas ĉi tie pri infanoj sep-, ok-, aŭ naŭjaraj, jam sufiĉe progresintaj por profiti el la legado de la tekstlibro, — kaj ne pri infanoj pli aĝaj, spirite pli evoluintaj, al kiuj la musohistorio ŝajnas tro bebeca, la humuro sensuka kaj la tuta kurso: teda.

Aliaj rektmetodaj kursoj (ekz. Csehkurso) baziĝas sur la tabel-vortoj kaj la vortderivado per afiksoj: la celo kaj la kvalito de la kursanoj motivas tiun labormanieron. Sed ĉi tie la aŭtoro zorge evitas — kaj prave — amasan kunigon de vortoj, komence tro malfacile rekoneblaj pro ilia simileco, kiel TIU, TIO, TIE, TIA, k.t.p. kaj lernigas nur la plej uzatajn, okaze, kiel izolitajn vortojn. Li montras sin malpli malfida rilate la afiksojn — kaj ankaŭ prave. Neniel intencan-



Jen bildo pri parto de la granda ekspozicio, kiun organizis la grupo de Groningen la 14-, 15- kaj 16-an de septembro en la „Harmonie”

te elĉerpi la kompletan kolekton, li per kelkaj ekzemploj ilustras la plej ofte bezonatajn (ilo, ejo, isto, eto, ega, igi, iĝi), diskrete atentigas pri la signifo de aliaj (mal, ge, ido, ono, adi, aro), senrimarke enŝovas la sporade uzatajn, prisilentas la provizore necesajn. Skribaj taskoj praktike ne estas antaŭviditaj: kio kompreneblas se oni konsideras la celon de la kurso. La demandoj ĉe la fino de la libro povus eventuale plibonigi tiun „mankon.”

La lingvo estas fidinda. Kelkaj rimarkoj tamen sin trudadas.

„Vesto” (p. 6 kaj 12) estu: jako, kaj „numerojn” (47): nombrojn.

„Orangos, violo, indigo” (15) kutime signifas respektive frukton, floron, substancan; ne: koloron. Anstataŭ: „Mi amas mian patron kaj patrinon” (37) kaj „Kion vi volas fari, kiam vi estas granda muso?” (39), oni legu: MIAJN, ESTOS.

„ANKAŬ” troviĝu antaŭ la vorto al kiu ĝi rilatas.

Nekonsekvence „ŝi skribis sur la nigraN tabuloN” sur la 19-a paĝo, kiam ĉie alie „ŝi skribis sur la nigra tabulo.”

La „blankaĵo” (56), precipe en leciono pri IG, prefere alprenu la formon blankigaĵo, kaj la „nenion” (61) respondanta al „Kiom pagi?” pli ĝuste fariĝu: neniom.

„Grimpi arbon” (31), „floti” (50) kaj „flotigi” (51), „iĝi aferoplena” (56) sentigas influon de la angla lingvo. Esperante oni grimpas SUR arbon, floSas kaj floSigas, iĝas MULTOKUPITA.

Kial ne ellasi la pronomon CI (43)? Kaj kial jes ellasi la artikolon en „lastan jaron mi estis...”, proksiman jaron mi estos...” (43)?

Konklude. La verketo, bele presita sur bona papero, estas meritplena tekstolibro por konversaciaj lecionoj en klaso de infanoj proksimume 7-ĝis 9-jaraj, kiuj jam scipovas legi kaj ankoraŭ ne perdis sian naivan fantaziejon, kondiĉe ke sperta instruanto adaptu precipe la komencajn numerojn al ilia asimilkapablo.

F. Couwenberg.

LA NICA LITERATURA REVUO, Adm.: R. Fiquet, 5, boulevard Stalingrad, Nice (A.M.), Francujo. Abonprezo: Sv.kr. 6 aŭ egalvaloro.

Dum preskaŭ la tuta vivodaŭro de Esperanto ni povis fieri pri revuo speciale dediĉita al la literaturo. Tamen, bedaŭrinde, tiu revuo ne estis konstante la sama; ekzistis jam pluraj kaj post malapero de unu baldaŭ aperis alia. Tio pravas du inter si kontraŭajn faktojn: unue, sen speciale literatura revuo la Esperanto-gazetaro ne estas kompleta (verdire literatura revuo devus kroni super ĉiuj ceteraj revuoj kaj gazetoj) kaj oni ĉiam sentis bezonon pri tia eldono; due, tiu bezono estas sentata nur ĉe tro malgranda nombro da esperantistoj, pro kio preskaŭ neniu tia revuo havis pli ol kelkjaran vivon. Nur „Literatura Mondo” faris escepton; tamen, ankaŭ ĝi malaperis.

Kaj jen, ni denove disponas pri tia revuo. Ĝia aspekto estas modesta, ĝia

(daŭrigo sur p. 7)

Esperantolando Vokas

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto de diverslandaj stacioj. Mallongigoj: I = informoj; K = kurso; P = parolad(et)oj aŭ prelego; m = ondlongo en metroj; kc = frekvenco en kilocikloj en sekundo; M = muziko. Tempindiko: M.E.T.

DIMANĈE:

15.00—15.15 Piraĉununga (Brazilo), 198 m (1520 kc): K.
24.00—00.30 Bilbao (Spanje), 265 m (1131 kc): P.

LUNDE:

13.30—14.00 La Coruña, 250 m (1200 kc): P kaj I.
23.40—23.57 Hilversum I, 402 m, (746 kc), NCRV: P pri: „La Evangelio en Esperanto”. Muzika enkadriĝo de Jelly Koopmans-Schotanus, sopranino, kaj Meindert Boekel, orgena akompano. (Nur la unuan lundon de ĉiu monato).

MARDE:

01.45—02.00 San José (Uruguay), 192 m (1562,5 kc): P.
12.55—13.00 Bern, 31,46 m (9535 kc), 48,66 m (6165 kc): P de d-ro Arthur Baur.
16.00—16.10 Ljubljana (Jugoslavujo), 327,1 m (914 kc), 221,4 m (1355 kc), 3,19 m (94100 kc), 3,23 m (92900 kc), 3,42 m (87700 kc): I.
18.35—18.40 Bern, la samaj ondlongoj, frekv. kaj P kiel 12.55.
18.55—19.10 Roma, 30,9 m (9710 kc), 41,24 m (7270 kc), 50,34 m (5960 kc): P de Luigi Minnaja aŭ prof. d-ro Vincenzo Musella alterne.
20.00—20.15 Stockholm, 19,9 m (15050 kc), 26,1 m (11513 kc), IBRA (Libera Sveda Kristana Radio per la sendilo Tanger, Norda Afriko): P kaj I. (Nur la lastan mardon de ĉiu monato).
20.15—20.30 Carlet (Hispanujo), 288 m (1040 kc): I.

MERKREDE:

17.00—17.10 Caramulo (Portugalo), 205 m (1463 kc): I.
18.55—19.10 Roma, 30,9 m (9710 kc), 41,24 m (7270 kc), 50,34 m (5960 kc): P de Luigi Minnaja.
22.55—23.05 Wien I, 25 m (12000 kc), 48 m (6250 kc), 208,4 m (1440 kc): I.
23.50—24.00 Hilversum II, 298 m (1004 kc) (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1957 per Hilversum I, 402 m (746 kc)), VARA: Socialismaj I.

JAŬDE:

07.45—07.50 Perpignan, 202 m (1483 kc): K de René Llech Walter.
09.30—09.40 Paris, 348 m (860 kc), 218 m (1380 kc): K. de Pierre Delaire.
12.55—13.00 Bern, ondlongoj kaj frekvencoj kiel marde: P de prof. d-ro Edmond Privat: „Esperanto-ideologio”.
18.35—18.40 Bern, la samaj ondlongoj, frekv. kaj P kiel 12.55.
23.30—24.00 Valencia, 200 m (1500 kc): P kaj I.
23.45—24.00 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m (1133 kc): P.

VENDREDE:

00.30—01.00 Sao Paulo (Brazilo), 62,83 m (4775 kc): I.
01.45—02.00 San José (Uruguay), 192 m (1562,5 kc): P.
18.55—19.10 Roma, ondlongoj kaj frekvencoj kiel marde: P de prof. d-ro Vincenzo Musella, kiu unufoje en ĉiu monato respondas leterojn de geaŭskultantoj al Radio Roma, Esperanto-fako, casella postale 320, Roma (Italujo).
20.15—20.30 Carlet (Hispanujo), 288 m (1040 kc): I.
22.30—22.45 Guatemala, 30,5 m (9836 kc), 47 m (6282 kc): I.

SABATE:

12.15—12.30 Rio de Janeiro, 214 m (1400 kc): K kaj I.
18.30—19.00 Rio de Janeiro, 16,8 m (17875 kc), 25,1 m (11950 kc), 30,7 m (9770 kc), 375 m (800 kc): P.
19.45—20.00 Barcelona, 360 m (833 kc): I kaj K.
23.15—23.25 Hilversum I, 402 m (746 kc) (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1957 per Hilversum II, 298 m (1004 kc), K.R.O.: Monata resumo de katolikaj I. (Nur la lastan sabaton de ĉiu monato; la aliajn sabatojn: Katolikaj I de 23.15—23.22).

Informoj kaj petoj:

Konservu ĉi-supran liston. — Pro pluraj modifoj kaj aldonoj ni devis denove kompili ĉi tiun rubrikon. Eltondu kaj konservu ĝin, ĉar provizore ne estos loko por reaperigi ĝin. Atentu ankaŭ la Esperanto-anguletojn en la radioprogramaroj. Se via radiopro-

gramaro ne havas tiajn Esperanto-anguletojn, malabonu ĝin kaj abonu alian, en kiu vi povas trovi informojn pri Esperanto-dissendoj.

Radio Roma. — Atentu pri la novaj ondlongoj kaj frekvencoj de ĉi tiu stacio. Gojiga estas ankaŭ la novaĵo, ke Radio Roma dissendas Esperanto-

kvaronhoron ne nur du, sed ek de 16/X/1956-a eĉ trifoje semajne, ĉar nun ankaŭ ĉiumarde estas aŭdebla Esperanto-programero de ĉi tiu stacio.

Jen detaloj pri la programoj en novembro 1956-a. La prelegontoj estas s-ro Luigi Minnaja (= Mi) kaj prof. d-ro Vincenzo Musella (= Mu). 2/XI: La dua de novembro (Mu). 6/XI: Antikvaj monumentoj de Ravenna (Mi). 7/XI: Mondo Esperantista (Mi). 9/XI: Italaj komponistoj: Bellini okaze de la 155-a datreveno de lia naskiĝo (Mu). 13/XI: La „Thermae de Caracalla” en Romo (Mu). 14/XI: Novaĵoj el Italujo (Mi). 16/XI: Libro Esperantlingven tradukitaj: „Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz (Mu). 20/XI: Pierluigi da Palestrina: la kantisto de Dio (Mi). 21/XI: Nia Gazeto (Mi). 23/XI: Leterkesto kaj bibliografio (Mu). 27/XI: Italaj belartaj urboj: Venecio (Mu). 28/XI: Tri gemoj de la Tireno: Vietri sul mare, Amalfi, Ravello (Mi). 30/XI: Italaj abatejoj: „Montecassino” (Mu). Skribu al Radio Roma, Esperantofako, casella postale 320, Roma (Italujo).

Esperanto-kurso per radio. — En pluraj landoj regule okazas Esperantokurso per radio, sed ne en Nederlando kiel antaŭ la milito. Ni pasinijare jam atentigis la NRU-on pri la enkondukindeco de Esp.-kurso. Ĝi respondis, ke la anglalingvaj kursoj por nederlandaj geelmigrontoj al anglalingva teritorio pli urĝas. Ni frapos denove kaj konstante sur la NRU-pordon kaj petas vin imiti nin.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de JONG Dzn, Radio-Servo N.C. K.E., Waltaweg 3, TJERKWERD bij BOLSWARD (Fr.), NEDERLANDO. 16/X/1956.

daŭrigo de p. 6

amplekso malgranda, kaj laŭnhave ĝi ne jam estas komparebla kun antaŭaj luksaj eldonoj. Tamen, ŝajnas al ni, ke la eldonantoj de la nova revuo agis tre prudente, donante al la revuo ne tre luksan aspekton (kio ja plialtigis la kostojn kaj pro tio verŝajne akcelus ĝian malaperon) kaj ne donante al ĝi plenartan tendencon. La sperto ja montris, ke la nombro da homoj kun vere artismaj konceptoj ne estas tre granda inter ni. Donante al la revuo pli popularan enhavon, la eldonantoj tre verŝajne certigis al la revuo pli grandan abonataron kaj per tio pli konstantan vivon. Ni tre esperas, ke ilia entrepreno montriĝos sukceso! Ĝia enhavo estas sufiĉe alloga, interesa kaj varia; kaj la bagatelaj mankoj iom post iom sendube cedos al kelkaj perfektigoj.

G. J. D.

BONA PROGRESO

La propagandistino de la „Oficejo por enkonduko de Esperanto en la Lernejoj”, f-ino C. M. Burger, dum multaj jaroj instruis la francan lingvon en mezgrada knabina lernejo en Utrecht. Tial ŝi elektis tiun urbon propagandcele.

Ŝi vizitis la skabenon pri instruado k.t.p. s-ron H. v. d. Vliet, kaj la komunan inspektoron pri instruado, s-ron P. F. v. Overbeeke, kaj pledis por la enkonduko de Esperanto-instruo en la lernejoj. Laŭ propono de tiuj aŭtoritatoj la urbestro de Utrecht informiĝis per cirkulero, ĉu la geinstruistoj de la unuagradaj lernejoj interesiĝas en kurso pri la internacia lingvo.

Provizore anoncis sin proksimume 50 geinstruistoj, inter kiuj 8 lernejestroj. La urbestro decidis financi du kursojn. Ili komenciĝis vendredon la 5an de oktobro. Sed pro diversaj kaŭzoj ĉeestis nur 20 partoprenantoj. La gvidanto estas la eminenta esperantisto s-ro J. Vaneček.

Ni gratulas la propagandistinon pro ŝia sukceso, kaj ni esperas ke multaj aliaj komunumaj estraroj sekvos la imitindan ekzemplon de la utrehta.

Alvoko

al la

Nederlanda Junularo Esperantista

En la U.K. en Kopenhago stariĝis prepar-komitato por reorganizi la tutmondan esperanto-junularon. Ankaŭ en nia lando ni intencas rekolekti la disigintajn junajn geesperantistojn kaj kelkaj junaj samideanoj, inter kiuj mi mem, komencis esplori la eblecojn. Nia unua paŝo estos la organizado.

SEMAJNFINO POR JUNAJ ESPERANTISTOJ en ROTTERDAM, 15—16 decembro, kun speciala programo por progresintoj. Maksimuma aĝo 25 jaroj. Komuna partopreno en la granda festvespero organizata de ĉiuj Roterdamaj kluboj okaze de Zamenhof tago. Loĝado en junulargastejo. Kotizo, inkluzive bileton por la festvespero kaj 3 manĝojn 6,50 gld. Petu aliĝilon kaj detalajn informojn de f-ino Helmi Veldhuyzen, Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

Mi tre esperas ke kiom eble plej multaj gejunuloj partoprenos en nia nova kampanjo!

Helmi Veldhuyzen.

LA STUDANTO

Jen la ĝustaj vortoj de

Ekzerco 35 A:

1: tio. 2: tiujn. 3: tiujn; kiuj (subjekto de la subpropozicio, do sen la grava litero n!); tiu. 4: tiun (indika pronomo, kiu komenciĝu per la litero t); ke (subjunkcio = voegwoord). 5: ke tiu. 6: tio (sen litero n, ĉar la vorteto estas subjekto de la frazo: Sed tio ofte estas tre persona opinio); kion (kun komenca litero k, ĉar estas relativa pronomo, kaj kun fina litero n, ĉar la vorto estas objekto en la interfrazeto: kion diras recenzisto). 7: Tio, kion. 8: tion (kun komenca litero t, ĉar estas indika vorto, kaj kun fina litero n, ĉar la vorto estas objekto de la frazo: tion la legantoj ofte tre ŝatas); kio (sen akuzativa litero n, ĉar la vorto estas subjekto de la interfrazeto: kio ne taŭgas laŭ recenzistoj). 9: ke; tiu (ne: tio, ĉar la vorto ne estas aparta, sed apartenas al la substantivo „libro”). 10: ke (subjunkcio!); tiu (indika vorto ĉe la sekvanta substantivo!), kiun (relativa vorto, kiu estas objekto en la frazeto: kiun vi deziras).

Jen ekzemploj de frazoj de

Ekzerco 34 B:

1: Li gargaras la gorgon per medikamento, ĉar li havas raŭkan voĉon, kaj lia edzino gargaras la tolaĵojn por forigi la sapon el ili. 2: Kiu kartavas, elparolas la sonon r ne per la pinto de la lango, sed vibrigante la uvulon kaj velon (= malmola palato). 3: La homa korpo konsistas i.a. el ostoj, karno kaj haŭto. 4: Vegetaranoj manĝas ne viandon aĉeteblan ĉe buĉisto, sed tuberojn, fruktojn kaj legomojn. 5: Fava haŭto de hundo estas tre malbelaspekta. 6: Reveturante, mi havis tre favoran venton. 7: Senharulo havas la avantaĝon, ke li ne bezonas frizi siajn harojn. 8: Jam en oktobro nokte povas frosti. 9: Elektro anstataŭas la gason en la lumigado. 10: Ŝia vualo konsistis el tre delikata gazo kun nigraj makuletoj.

NOVAJ EKZERCOJ:

Ekzerco 36 A

(por gekomencantoj):

Aldonu —a, —an, —aj, —ajn, —o, —on, —oj aŭ —ojn:
1: „Mi deziras aĉeti bel— roz—.” 2: „Ki— roz— vi deziras, ĉu ruĝ— aŭ blank—?” 3: „La flav— roz— estas la plej bel— laŭ mi.” 4: „Ni— roz— flav— estas pli multekost— ol la ali—.” 5: „Mi tamen deziras buked— da flav— roz—.” 6: „El kiom da roz— devas konsisti la buked—?” 7: „Mi

preferas buked— el naŭ branĉ—.” 8: „Laŭ vi— dezir— mi prenos naŭ branĉ— por kunmeti la buked—.” 9: „Mi— kor— dank—, sinjor—, ĵen dek—gulden— bankbilet—, kiu certe estos sufiĉ—.” 10: „Eĉ pli ol sufiĉ—: mi repagos al vi sum— sufiĉ— por aĉeti mult— flor— en mi— florbutik—.”

Ekzerco 35 B

(por geprogresintoj):

Aldonu la ĝustan finaĵon al la nekompletaj vortoj:

1: En la densa, moderna internacia trafiko estas neces— havi komunan lingvon. 2: Estas rekomendind—, ke ĉiu infano lern— krom si— propr— lingv— ankaŭ komun—, inter—naci—. 3: Ni, Esperantistoj, preferas Esperant— kiel internaci— lingv—. 4: Ni rigardas Esperant— la plej regul—, sistem— ordigit— kaj do plej facil— lernebl— lingv—. 5: Fari pli simpl— lingv— ne estas facil—. 6: Farint— ĝin „pli simpl—”, oni ofte faris ĝin malpli klar—. 7: Projekt— farit— pli laŭ ies propr— lingv— saĝnas pli simpl— al la projektint— mem. 8: Sed ĝeneral— ĝi montriĝas pli malfacil— por aliland— gelernont—. 9: Ver—, se ĉiuj Esperantistoj modif— Esperant— laŭ si— propr— dezir—, ni hav— tiom da Esperantid— kiom da ŝanĝemul—. 10: Feliĉ—, la mult— pli mult— gesamidean— preferas lasi kaj uzi Esperant— ti— ki— ĝis estas kaj montriĝis uzebl—.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu (kun poŝtmarko por la resendado)! al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn, Waltaweg 3, TJERKWERD (Fr.).

Mabesoone Fondajo

La komitato atentigas la sekciojn kaj ĝeneralajn membrojn pri la artikolo en la januara numero de N.E. Precipe pri la peto, ke oni sendu la monon al la kasistino, F.ino J. E. Prins, Hora Siccamingel 294, ĝironumero 81588, Groningen, plej malfrue dum novembro de la kuranta jaro. Ĝis nun la komitato ricevis de:

Sekcio Alkmaar	gld.	18,—
Sekcio Deventer	„	20,—
Sekcio Groningen	„	70,—
S.ro J. B. Appingedam	„	2,—
S.ro L. C. S. Groningen	„	5,—
		entute gld. 115,—

Koran dankon.

J. V. H.